2-a Jaro. N-o 43 (95) APERAS  SEMAJNE 22. Julio 1926

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktanto: E. LANTY
14, Avenue de Corbéra, Paris-XIIe

Sidejo de Ekzekutiva Komisiono de SAT
23, Rue Boyer, Paris-XXe

Administranto: R. LERCHNER
Colmstrasse 1, Leipzig O 27

La VI-a SAT-Kongreso honorata per speciala Poŝtmarko

Tio ne okazis iam en la historio de nia movado!

Kongreslando aperigas honore al Esperanto-Kongreso specialan poŝtmarkon!

Tiu informo estas apenaŭ kredebla: ni ja kutimis, ke oni rilatas al esperanto kiel al afero privata; ke esperanto-kongresoj en plej bona okazo venigas post si aperon de pli-malpli detalaj raportaj aŭ informaj artikoloj en ĵurnalaro. Ni ne kutimis, ke oni honoru nian movadon per iuj specialaj registaraj agoj.

Kaj tamen ĝi estas fakto: la bildo ĉi apuda reproduktas ĵus aperintan en Sovetio specialan poŝtmarkon honore al la VI-a SAT-Kongreso.

Ŝajne ni ne bezonas detale komenti tiun ĉi fakton: ĝi parolas elokvente per si mem. Nia SAT estas fakto jam sufiĉe reala, ĝi jam estas atentata de proletaj organizaĵoj — kia estas Sovetio kiel Ŝtato de laboristaro.

Popolkomisario por poŝtoj kaj telegrafoj ĉiam zorgis, ke, uzataj kiel iu oportuna signo pri pagiteco de poŝtaj servoj, poŝtmarkoj havu samtempe iun edukan karakteron, ke ili respegulu la idearon de l' laborista klaso. Anstataŭ portretoj de caroj, anstataŭ simboloj de cara aŭtokratismo — sur sovetiaj poŝtmarkoj aperas simboloj de laboro, de arto, de scienco, bildoj de kamparano, de laboristo, de ruĝarmeano, de inĝeniero, bildoj el la revolucia pasinto de la lando. Unu post la alia tiuj poŝtmarkoj respegulas la batalon de l' laborista klaso en la antaŭo kaj en la nuno.



Kaj jen en tiu serio de memorigaj poŝtmarkoj aperas marko honore al la VI-a SAT-Kongreso...

Kion rakontas la marko.

En ĝia centra ovalo estas prezentita la obelisko de Libero sur Soveta Placo en Moskvo, de post kies pinto eliĝas tri literoj: SAT.

La obelisko estis inaŭgurata dum la unuaj jaroj de la Revolucio, en ĝi respeguliĝis la entuziasmo de la Revolucio, kaj samtempe ĝi estas simbolo de l' proleta Sovetio: sur ĉiu el la tri flankoj de la triangula fundamenta parto de l' obelisko estas ĉizita ĉapitro post ĉapitro la Konstitucio, la fundamenta leĝo de Soveta Respubliko.

Sur la miniatura bildo de la poŝtmarko certe ne estas videblaj tiaj detaloj, samkiel ne estas reliefe videbla la bela figuro de virino, alvoke etendinta sian manon. Tial verŝajne, la desegnisto metis sub la ovalon de la obelisko la ŝildon kun martelo kaj rikoltilo — la simboloj de l' proleta Ŝtato.

Nerimarkebla estas ankaŭ la devizo de l' batalanta proletaro: « Proletarioj de ĉiuj landoj unuiĝu! ». Sed tamen ĝi enestas sur la poŝtmarko kaj eĉ dulingve — ruse kaj esperante. Observu atente la du malkontinuajn liniojn, formantajn la randon de l' centra ovalo, kaj vi rimarkos, ke per Morsa alfabeto (telegrafa signaro) estas skribita la devizo ambaŭlingve.

Ĉiuj surskriboj de la poŝtmarko estas faritaj en esperanto, kaj tri el ili paralele ankaŭ ruslingve. Do, tiu ĉi poŝtmarko estas la unua, sur kiu *kiel ĉefa lingvo* estas uzata la artefarita kaj la natura lingvoj — la rusa — nur kiel akcesoraĵo.

Multo nova, multo aroga estas en tiu ĉi poŝtmarko: ĝia dediĉo al kongreso de proleta esperantista organizaĵo, ĝiaj verdaj kvinpintaj esperantistaj steloj, ĝiaj nordaj abioj de la desegna ornamento, kaj fine — la uzo de artefarita Morsa alfabeto kaj de artefarita esperanto kiel ĉeflingvo.

Kaj la tuto — la verda koloro kun helruĝa ovalo sur la sepkopeka kaj kun la violkolora ovalo sur la 14-kopeka poŝtmarkoj — la tuto faras belan impreson...

Iom el la historio de l' poŝtmarko.

La Popolkomisario por poŝtoj kaj telegrafoj jam kelkfoje montris sian konvinkon pri utilo de esperanto: ĝi aperigis Popov-poŝtmarkon kun esperant-lingva teksto, ĝi aperigis jam kelkajn specojn de oficialaj poŝtkartoj esperanttekstajn, ĝi *jus dekretis esperanton klara lingvo por telegrafado.*

Do ne miriga estas la apero de SAT-poŝtmarko. Per ĝi kvazaŭ estas substrekata la praktika valoro de SAT, organizanto per esperanto de interproleta kunligo kaj de praktika esperanto-uzado proletcela.

Jam en marto ni estis informitaj pri la decido de l' Popolkomisario aperigi specialan poŝtmarkon honore al la VI-a. Sed tio ne estis por ni iel definitive kredebla, ĝis en majo estis senditaj al ni por eventuala aprobo kelkaj projekt-desegnaĵoj. Eble iam estos reproduktataj tiuj ĉi projektoj, kiel iu historiaĵo. Hodiaŭ ni nur diru, ke neniu el ili logis nin. Eĉ la desegnaĵo kun bele plenumita portreto de L. Zamenhof.

Kaj ni decidis proponi nian projekton. La taskon plenumi ĝin prenis sur sin nia Moskva SAT-ano K-do S. Starŝinov-Kudrjavcev, fakulo de desegna arto. Al li ni skizis la ĉefan ideon de la desegnaĵo kaj li eklaboris.

Jen la projekto en ĉefaj trajtoj estas preta. Kun ĝi mi kuras al K-do N. Modenov, laŭ kies propono estas farita la decido de l' Popolkomisario pri aperigo de la marko. Kaj en lia laborĉambro ni pripensas la ceterajn detalojn de la desegnaĵo. Sufiĉe longe ni meditis pri la ĉefa surskribo. Necesis ke ĝi estu tuje komprenebla por ĉiu, kiu konas nur la alfabeton, necesis ke la vorto « Esperanto » estu tutklare videbla. Post longaj serĉadoj ni elektis la simplan kaj kontentigan: « *VI Internacia Proletaria Esperanto-Kongreso 1926* ». Kiu ĝin ne komprenos?

K-do Modenov rimarkigas, ke mankas la proleta devizo kaj tuj mem proponas la solvon por enmeti ĝin, sufiĉe longan, sur la miniatura desegnaĵo: uzi Morsan alfabeton.

Fine, la preta projekto estas transdonata, kaj granda amiko de esperanto, Kolegi-membro de l' Popolkomisario K-do Musatov, plej multe zorginta por aperigo de la marko, aprobas la projekton.

La afero nun progresas, instigata de klopodema K-do Ĵavoronkov, senĉese telefonanta al la koncernaj institucioj por plirapidigi la aperigon. En la lastaj tagoj de junio ni ricevas jam presitajn specimen-ekzemplerojn por diri nian definitivan opinion kaj por kontroli la ĝustecon de la esperantlingva teksto.

Kaj la 3-an de julio ni ricevas la unuajn ekzemplerojn de la presita poŝtmarko.

Kvazaŭa fabelo.

Ĉu ne estas fabela tiu rakonto?

Ĉu ne estas fabele, ke ni, ordinaraj viculoj, simplaj laboruloj estis tiel proksime partoprenantaj en la teknika prizorgo, de l' poŝtmarko? Ke la bildo de l' marko estis kolektive kreata? Ĉu ne estas fabele, ke la juna kelkmilmembra SAT povas jam nun tiel efiki sur ŝtatan komisarion?

Estas ja kvazaŭa fabelo, sed tamen reala fakto. Nedubeble la respondeculoj de l' Komisario por poŝtoj kaj telegrafoj komprenis bone, ke la forto de nia Asocio estas ĉefe dinamika kaj sekve ne devas esti mezurebla per ordinaraj mezuriloj.

Ĉu decas tamen, ke la nomo « SAT » aperas sur oficiala ŝtata dokumento? Jes, decas ĉar la nomo « U. S. S. R. » estas simbolo de nenacia ŝtato, de la Ŝtato, en kies nomo forestas nomo de ajna nacio, do — nomo sennacieca.

Kaj ĉu do ne estas la tuto de l' marko, kun la obelisko de Libero, kaj kun tiuj literoj — la simbolo de la estonta sennacieca organizo de l' mondo, kie

« ...flirtos tre bela flag' super senlima land' » ?

G. Demidjuk.

Al atento de la Kongresanoj

La 5-an de julio la listo de l' kongresanoj, pri kiuj la enketinformoj venis ĝis tiu tago al Moskvo estas transdonita al Popola Komisario de eksteraj aferoj kaj estas ricevita la certigo, ke ne pli malfrue ol 25-an de julio ĉiuj koncernaj ambasadorejoj havos pretaj la vizojn por la kongresanoj.

Sekve la K-doj, veturontaj al la Kongreso volu la 23-24-25-an de julio viziti aŭ rilatiĝi kun sovetia ambasadorejo por recevi la vizon. *La vizoj estas liberigitaj je ajna pago, sekve la kongresanoj devos neniom pagi por ili.*

Oni atentu, ke por kelkaj landoj la afero estas aranĝita tiele, ke ili povas ricevi la vizon ne nur en sia loĝlando, sed ankaŭ en alia, nome:

K-doj el Polio povas ricevi la vizon en Polio kaj Latvio.

K-doj el Litovio povas ricevi la vizon en Litovio kaj Latvio.

K-doj el Nederlando povas ricevi la vizon en Germanio kaj Anglio.

K-doj el Hispanio povas ricevi la vizon en Francio.

K-doj el Urugvajo povas ricevi la vizon en Francio kaj Anglio.

K-doj el Jugoslavio povas ricevi la vizon en Aŭstrio (Wien).

Daŭras la klopodoj por pli bonŝanca organizo de postkongresa ekskurso al Moskvo kun vizitoj al Moskvaj fabrikoj, uzinoj kaj institucioj kaj kun eventuala solena kunsido. La 14-a de aŭgusto okazos en Moskvo radiotelefona prikongresa soleno: kongresanoj diverslingvaj ekstaros unu post alia antaŭ mikrofono por saluti en esperanto la K-dojn, ne povintajn veni al Leningrad. Tiu radio-paroladaro okazos de la sesa ĝis la sepa vespere (mez-eŭropa tempo) per la stacio je la nomo de Komintern, je ondlongo 1450-metra. Kiu ne povas veni al la Kongreso, jam nun preparu sin por aŭskulti perradie kongresanojn.

G. Demidjuk.

Moskvo, 5-an de julio 1926.



★ VI-a SAT-KONGRESO

EN LENINGRAD

5.—10. aŭgusto 1926

KONGRES-KOMITATO

Gek-doj: Koĉkin, Lisicin, Podkaminer, Semjonova, Urban.

KORESPOND-ADRESO:

K-do S. Podkaminer, Petropavlovskaja 4, kv. 34, Leningrad — Sovetio.

KOTIZO: Egala al la jara SAT-kotizo.

ALIĜILOJ

Skribu la nomon, antaŭnomon, adreson, profesion, partitendencon, n-on de SAT-matrikulo, notu ĉu vi estas aktiva aŭ pasiva membro.

4-a LISTO DE ALIĜINTOJ

156	K-do	Ruvinskij, I., Makejevka	5551
157	—	Ĵeleznjakov, B., Sverdlovsk	5583
158	—	Teterin, G., Leningrad	1473
159	—	Belajev, V., —	1081
160	K-ino	Ŝtumberg, A., —	
161	K-do	Zlotarj, K., —	2038
162	K-ino	Naĥimoviĉ —	5675
163	K-do	Joĥin, N., —	6389
164	—	Tadeosjanc, A., Blagodatno-Stepanovka	4027
165	—	Kotelevcev, V., Ekaterinoslav	5711
166	—	Andrejev M. Leninsk-Turkmensk	4003
167	—	Sidorov, A., Rostov/Don	5458
168	K-ino	Svistunova, K., Moskvo	
169	K-do	Svistunov, V., —	5582
170	—	Jasinskij, P., Kereto	5699
171	—	Hajrapetjan, B., Baku	2040
172	—	Fedotov, N., Novoĉerkssk	3736
173	—	Ŝirjaev, B., Maĥaĉ-Kala	5299
174	—	Kuriĉ, J., Moskvo	5905
175	—	Alalikin, A., Vjatka	3982
176	—	Panŝin, S., Kimri	1035
177	—	Ozornin, F., Ŝepetovka	6287
178	—	Ŝvarc, J., Petrovsk-Zabaikalskij	5766
179	—	Tomilov, A., —	5580
180	—	Korolev, N., Kovrov	
181	—	Perelŝtejn, B., Moskvo	3940
182	—	Vajnŝtejn, S., Kiev	5279
183	—	Novokreŝĉenov, A., Serdobsk	5714
184	—	Kuzmiĉ, V., Harjkov	3975
185	K-ino	Alekseeva, M., Niĵnij-Novgorod	5506
186	K-do	Dimitrov, I., X.	
187	—	Fonkaĉ, G., Moskvo	
188	—	Erben, R., Pilnikau ap. Trautenau	7051
189	—	Nixedorf, F., Herne i/Westfalen	5801
190	—	Robig, F., Rotterdam	1280
191	—	Goŝ'i, J., Lwow	7121
192	K-ino	Limouzin, E,, Paris	509
193	K-do	Fejta, M., Lwow	7073
194	K-ino	Savage, C., Blackburn	4302
195	K-do	Agatz, W., Heisingen ap. Essen	5318
196	—	Aas, H., Oslo	767
197	—	Schulze, G., Berlin	2508
198	—	Whitham, A., Burnley	1351
199	—	Bratanovskij, V., Ĉimkent	5328
200	—	Paŝkeviĉius, A., X.	4884
201	—	Straach, P., Netzschkau i/V.	5813
202	—	Petzold, M., —	557
203	—	Schiffer, H., Lwow	7018
204	—	Schuss, M., Nowy Sacz	7010
205	K-ino	Lehmann, K., Leipzig	913
206	K-do	Vogel, W., Leipzig	174
207	—	Muribo, M., Oslo	102
208	—	Valĉev, V., X.	7077
209	—	Hristozov, V., X.	7078
210	—	Naumann, W., Engelsdorf ap. Leipzig	7049
211	K-ino	Drezen, H., Tallinn	4227
212	K-do	Delĉev, S., X.	7079
213	—	Glöckl, K., Nürnberg	4955
214	—	Georgiev, J., X.	1130
215	—	Nixedorf, P., Herne i/Westfalen	5615
216	—	Krasnopolskij, A., Vasiljevskoje ap. Kaluga	5461
217	—	Bogdanov, S., Lugansk	4604
218	—	Fajbiŝeviĉ, M., Smolensk	6763
219	—	Jermakov, I., Samara	6749
220	—	Riĵij, F., Poltava	1121
221	—	Kapustjanskij, V., Poltava	5918
222	—	Ĵarov, V., Bogorodsk ap. Moskvo	4791
223	—	Bogdanov, V., Veliĵ ap. Pskov	6766
224	—	Goldfeder, S., Krjukov/Dnjepr	5448
225	K-ino	Baĵanova, V., —	7112
226	K-do	Taralkij, —	7002
227	—	Izgur, M., Kremenĉug	3870
228	—	Izgur, E., —	2332
229	—	Kolĉinskij, V., —	1447
230	—	Nosko, P., Salsk-Kaŭkazo.	5556
231	—	Humenjuk, A., Krjukov/Dnjepr	
232	—	Povoroznik, N., Bobrujsk	3641
233	—	Hibŝ, L., Odessa	818
234	K-ino	Reznikova, E., —	6227
235	K-do	Ĝojvivulo, Nadeĵdinsk	5509
236	—	Penza Gubernia Komitato de SEU	
237	—	Liljer, A., Moskvo	4200
238	—	Sutkovoj, V., Odessa	784
239	—	Raguier, G., Eaubonne	740
240	—	Lanty, E., Paris	1
241	—	Yelland, E., London	164
242	K-ino	Suĵadinova-Yelland, —	1053
243	K-do	Azorin, F., Cordoba	3681
244	—	Poljanskij, N., Moskvo	
245	—	Jeremejev, S., Rtiŝĉevo ap. Saratov	
246	—	Glodeau, L., Paris	50
247	—	B., L., —	11
248	—	Burda, R., Plzen-Letna	409
249	—	Batta, J., Wien	246
250	K-ino	Batta, M., —	633
251	—	Duemke, H., Leipzig	7035
252	K-do	Duemke, R., —	7036
253	—	Wenzel, A., Wurzen	1223
254	—	Borrell, J., Barcelona	357
255	—	Argué i Salto —	6958
256	—	Vilaginés, M., —	4573
257	—	Bermejo, B., Montevideo	2495
258	—	Oliveras, J., —	2003
259	—	Sender, M., Barcelona	356
260	—	Egert, H., Essen	4563
261	—	Schinkel, R., Leipzig	135
262	—	De Bruin, G., Enschede	670
263	—	Schönherz, Z., Brno	6073
264	K-ino	Boxhammer, M., Dresden	4010
265	K-do	Neumann, W., —	4386
266	—	Nitzsche, R., —	1598
267	—	Haseloff, E., —	5827
268	—	Löwe, E., —	98
269	—	Starr, M., London	488
270	—	Naumann, F., Zeitz	5673
271	—	Hock, I., Zagreb	6507
272	—	Nikŝiĉ, H., Zagreb	1361
273	—	Günte , O., Gablonz	
274	—	Böhmer, W., Reichenberg	6087
275	K-ino	Bauer, E., Gablonz ap. N.	2067
276	—	Jäkel, M., Schlag ap. Gablonz	4656
277	K-do	Bauer, F., Gablonz ap. N.	2066
278	—	Wigh, A., Inzersdorf ap. Wien	4977
279	—	Hans, F., Rothenbach	3834
280	K-ino	Majzlis, L., Ĉita	4612
281	K-do	Kolbin, J., —	5596
282	—	Faddejev, K.,—	3717
283	—	Brelgin, K., —	5595
284	—	Baĵenov, V., —	1367
285	—	Krutikov, S.,—	6436
286	—	Kolbin, N., —	5597
287	—	Stefanoviĉ, K.,—	5592
288	—	Vail, M., Kiev	5656
289	—	Astafjev, P., Samara	4605
290	K-ino	Gordon, V., Leningrad	4045
291	K-ino	Brukson, M., Leningrad	1396
292	K-do	Brukson, J., —	1896
293	—	Vasilĉenko, P., Krasnodar	
294	—	Golubcov, I., Kuzemkino ap. Leningrad	
295	—	Staĥurskij, A., Ludinovo ap. Brjansk	5698
296	—	Bojev, S., Poltorack (Turkmenio)	4358
297	—	Dovgal, I., Baĥmaĉ	
298	—	Golovŝĉikov, I., Armavir	6549
299	K-ino	Medvedeva, A., Ivanovo-Voznesensk	6321
300	K-do	Zamjatin, V., St.Viĉuga ap. Ivanovo-Voznesensk.	
301	—	Maslenko, A., Brjansk	4017
302	—	Bokarjov, E., Rostov/Don	5117
303	—	Kletenik, S., —	5430
304	—	Baranov, V., —	6478
305	—	Namov, G., —	5908
306	K-ino	Barabanova, G., —	6934
307	K-do	Filipov, G., Harjkov	5221
308	K-ino	Blumert, V., Leningrad	
309	—	Zavadskaja-Krasnopolskaja, Z., Leningrad	6476
310	K-do	Zavadskij-Krasnopolskij	6475
311	—	Varankin, V., Tverj	1116
312	—	Boĉkarev, N., Zmeinogrskoje (Siberio)	7197
313	—	Crisford, S., Battersea ap. London	7160
314	—	Coursier, A., Birminghan	7159
315	—	Tomrley, C., Oslington ap. London	7157
316	K-ino	Coursier, M., Birmingham	7158
317	K-do	Sons, F., London	6918
318	—	Hall, R., Peterborough	7145
319	—	Atkinson, G., London	7144
320	—	Hydes, L., Thames Ditton	7143
321	—	Taylor, London	7142
322	—	Chatters, W., London	4289
323	—	Enghardt, H., Leipzig	1031
324	—	Riedel, R., —	703
325	—	Schlitmann, J., Dachau ap. München	4160
326	—	Hoffmann, H., Augsburg	62
327	—	Rödel, E., Leipzig-Lindenau	5068
328	K-ino	Hombrook, A., Purley-Surrey	7146
329	K-do	Wysocki, P., Ekaterinoslav	4537
330	—	Suomi, W., Helsinki	4122
331	—	Ŝokurov, P., Novoje ap. Ugliĉ	4176
332	—	Ivanov, V., Odessa	783
333	K-ino	Alaŭdina, O., Ivanovo-Voznesensk	6162
334	K-do	Tava, Kadzuvo., Harbin	6956
335	—	Krapivin, P., Jakovleviĉi	6351
336	K-ino	Lebedeva, A., Minsk	
337	K-do	Botvinik, S., —	
338	—	Ŝukeviĉ-Tretjakov, R., —	5321
339	K-ino	Ŝukeviĉ-Tretjakova, S.,—	
340	K-do	Ludzskij, T., Leningrad	5570

Kongresontoj, atentu!

Se K-doj deziras veturi tra Latvio, mi sciigas, ke vagonaro foriras de Riga je la 6.30 vespere, alvenas Leningradon la venontan tagon je la 7.50 vespere. La bileto Riga-Leningrado III-a klasa kostas: L. 22.67. (1 lato egalvaloras gm. 0.80).

Riga'aj SAT-anoj intencas aranĝi ekskurson al la marbordo. Informojn pretas liveri K-do Krastin, Riga, Latvio, Matisa iela 52-a, dz. 1.



Antaŭ nia Kongreso

Baldaŭ ĝi okazos, nia VI-a! Kunvenos SAT-anoj diverssektoraj por priparoli kune la interesojn de nia organizaĵo.

Ĝis nun troviĝis en la tagordoj de niaj kongresoj ĉiam multaj proponoj pri ŝanĝoj, plibonigoj kaj kompletigoj de nia Statuto. En la komencaj jaroj ĉi tio estis necesa kaj utila. Estus ja neverŝajnaĵo, ke ĉe ĝia fondo ellaboritaj regularoj tuj montriĝus tute taŭgaj kaj perfektaj. Sed nun, K-doj, sufiĉe ni ŝanĝis.

Ke nia Asocio ankoraŭ ne havas dek mil membrojn, ke nia Jarlibro ankoraŭ ne estas impona enciklopedio, ke « S-ulo » ankoraŭ ne estas 20-paĝa, ke « S. R. » ankoraŭ ne aperas en dikaj volumoj, kelkvorte: ke nia Asocio ankoraŭ ne estas tiel granda, kiel ni volus kaj kiel ĝi devus esti, *pri tio ne kulpas nia Statuto.*

Tial ĉesu nia ŝanĝemo. Ni klopodu prefere plibonigi niajn taktikon kaj labormetodojn.

Ni propagandu kaj reklamu nian Asocion, sisteme, laŭplane. Samurbaj aŭ samregionaj K-doj kune priparolu la aferon kaj ellaboru laborprogramon. Ĉiu laborista esperantisto devas esti informata pri SAT, pri ĝia laboro, pri ĝiaj organoj. En naciaj esperantaj gazetoj regule ni aperigu artikolojn aŭ anoncojn pri SAT. Ni organizu la vendadon de SAT-eldonaĵoj en la grupoj, ni vendu ponumere niajn gazetojn ktp. Mallonge: ni *organizu* nian propagandon. Tiam ni gajnos membrojn kaj abonantojn, tiam nia organizaĵo kreskos kaj plifortiĝos. Dekmilmembra anaro, multpaĝa SENNACIULO, dika, multrubrika, impresa *Sennacieca Revuo,* ĉiumonata apero de grava libro ne estas fantaziaĵoj, sed efektivigeblaĵoj. Necesas nur ke ni *laboru* por ĝi.

En tia spirito laboru nia VI-a.

670 (Enschede).

La SAT-aparato servas

Represis el SENNACIULO gazetoj *Raboĉij Putj* (pri vivo en Italio, pri bulgaraj gazetoj kaj strikoj en Ameriko kaj Ĉeĥo-Slovakio), *Krasnoarmejskaja Pravda* (pri vivo de latvia kamparanaro, pri ĉeĥo-slovaka armeo, pri militŝiparo diverslanda), *Smolenskaja Derevnja* (pri vivo de latvia kamparanaro).

El *Sennacieca Revuo*: *Auckland Labour News* (Aŭstralio) 1-V-1926 — « Dia amo per grenadoj [N. 12 (24)]; *Corriere del Mare* (publikata sur bordo de ŝipo « Giulio Cesare », Italio) — IV-a, V-a, VI-a — « Ventoŝipo sen veloj » [N. 8 (20)]; *Przeglasd Ksiesgarski* (Warszawa), N. 2, 3, 4/5, 7 — « La libro de estonto » (N-oj 1-2/13-14, 6/18, 11/23).

★

Prolet-Gazet-Informservo por la franclingvaj landoj, kies sekretario estas K-do Chamarre (La Roŝel), sukcesis, dum la lastaj tri monatoj, represigi el « S-ulo » 23 artikolojn en 9 diversaj ĵurnaloj.

☆ DISKUTEJO ☆

Pri " Frontunueco "

(*Daŭrigo* *)

La organoj de SAT.

Tiu demando indus ampleksan pritraktadon. Sed necesas ne tro rabi spacon en la gazeto; tial mi provu diri mian opinion kiel eble plej koncize.

Unue mi deklaras, ke la plano de K-do Zilberfarb ŝajnas preskaŭ tute aprobinda. Bedaŭrinde ne sufiĉas desegni belan planon por ke efektiviĝu la planotaĵo. Necesas plie taŭga materialo: la redaktoroj de niaj gazetoj povas ja elekti nur el la ricevitaj artikoloj.

Raporti objektive kaj interese ne estas tiel facile kiel kelkiuj supozas. Ofte mankas ĉe korespondantoj ne nur sufiĉa klereco, sed eĉ elektokapableco pri la temoj pritraktindaj. Tro da K-doj forgesas, ke ili verkas por tutmonda legantaro; ili kelkfoje raportas pri faktoj, havantaj ĉefe nacian, eĉ lokan intereson. Ankaŭ tro da raportantoj ne atentas, ke « S-ulo » ne estas ĉiutaga ĵurnalo; ili sendas informojn, kies sola intereso kuŝas en la aktualeco — aktualeco jam forpasinta, kiam aperas la artikoloj.

Jam delonge ni diradas, ke la SAT-anoj devas kutimiĝi al eksternacia sent- kaj penskapablo. Sed tia kapablo ne rapide kreskas. Necesas eduki tamen aron da korespondantoj, kapablaj prikonsideri plej simplan fakton en ĝia rilato kun la tutmonda historia proceso. Nur tiele niaj gazetoj akiros apartan karakteron, senteblan originalecon. Ne facila la tasko, kiel montras la sperto. Sed ni devas forte konvinkiĝi, ke nur celante al tiu direkto ni povos, post diversaj provoj, fine atingi la celon.

Pravas certe K-do Zilberfarb, dirante, ke « S-ulo » ne devas enhavi « belvortajn artifikaĵojn de ĵurnalistoj ». Estas ja vere, ke simplaj laboristoj kelkfoje malsukcesas en verkado de raportoj ĝuste pro tio, ke ili penas imiti la profesiajn publicistojn. Laboristoj verkus pli leginde, se ili rakontus tute simple pri sia profesio, pri sia propra vivo, ol penante raporti pri politikaj okazintaĵoj. Nedubeble ĉiu laboristo havas en iu angulo de sia cerbo ion sciigindan, iun konigindan observaĵon.

La tasko de Redaktoro estas malkovri ĉe korespondantoj tiujn kaŝitajn trezorojn. Li devas instigi, konsili, kritiki — kaj senkompate fortranĉi la superfluaĵojn el la artikoloj ricevitaj. Treege grava estas la tasko de Redaktoro, se ĝi ne limiĝas je la nura kolektado de artikoloj. Ni ne estu tamen tro postulemaj. Ni konsciu pri la juneco de nia movado, pri ĝia ne nur mona, sed ankaŭ intelekta malriĉeco. Vidi la mankojn estas la unua kondiĉo por ke iom post iom ni povu ilin forigi.

Mi konsentas, ke « S-ulo » devas esti ĉefe informa, sed ne en la senco de l' ĉiutagaj ĵurnaloj. Ĝi ne estu tute plenigata de informoj. Necesas varieco. Ne ĉiuj legantoj interesiĝas pri la sama temo. Mi opinias, ke ne estus domaĝe, se aperus diskutoj (ne disputoj) pri teoriaj demandoj. Necesas nur limigi la amplekson de l' diskutoj kaj eviti, ke ili aliiĝu en polemikadon.

Ni ne forgesu ankaŭ, ke la plej granda parto el la legantoj propagandas esperanton. Ili do bezonas esti informataj pri la tuta esperanta movado. Tro ofte mankis en « S-ulo » informoj, kiujn la esperanto-agitistoj devis ĉerpi el neŭtralaj gazetoj. Tia situacio estas likvidenda. La SAT-anoj ne estu devigataj aboni neŭtralan gazeton por esti informataj pri la ĝenerala stato de l' esperanta movado.

Kompreneble ne povas temi pri publikigado de raportoj en kiuj la nomoj kaj titoloj de ĉiuj eminentuloj estas, sen ia etigo, citataj, kiel okazas en burĝaj gazetoj. Sed estas eble per kvar aŭ kvin linioj informi la legantaron pri gravaj okazintaĵoj. Ekzemple, ĉu ne estas bedaŭrinde, ke l'inaŭguro de l' Zamenhofa Monumento en Varsovio ne estis konigata al la SAT-anaro ?...

Sufiĉe larĝa loko estu do rezervata al la laborista esperanta movado, kaj plimallarĝa al la neŭtrala. La redaktora tasko estu difini ĝustan proporcion, konsidere la celon de nia gazeto.

Ĉu paroli pri « La Lernanto » ? Ne utilus. Neniu opinias, ke tiu folieto respondas al la deziroj de lernantoj. Necesas, ke iu K-do, sperta en la instruado de esperanto, prenu sur sin la taskon pri kolektado de taŭga materialo, ĝin prilaboru kaj ankaŭ aldonu la necesajn klarigojn gramatikajn kaj prilingvajn komentojn. Se « La Lernanto » estus plene taŭga, la nacilingvaj organizoj povus aĉeti la necesan kvanton por aldoni al siaj propagandaj organoj kaj tiele forigi el ĉilastaj ĉiun esperantan tekston.

Ankaŭ pri « S. R. » mi silentu. La respondecaj redaktoroj jam plurfoje faris la necesajn rimarkojn en « Redakcia Angulo ». La sperto montris, ke ne sufiĉas fari varmajn alvokojn por ke tuj sin prezentu bonvolaj kaj spertaj kunlaborantoj en ĉiuj kulturcentroj.

La organoj de nia Asocio estos tiaj, kiaj faros ilin la SAT-anoj mem. Nia movado pli bezonas plenumantojn spertajn ol nurajn proponantojn kaj kritikantojn.

★

Frakcioj.

Kio estas frakcio ? Mi malfermas la vortaron de Kabe kaj legas: *Frakcio estas parto de unuo.* Bona difino. Kaj se oni konsentas pri ĝi, tuj evidentiĝas, ke SAT konsistas el frakcio da anarkistoj, frakcio da komunistoj, frakcio da socialistoj, ktp. Kaj tiuj frakcioj konsistigas la unuon SAT.

Dezirinde aŭ ne, aktive aŭ latente, frakcioj ekzistas, ne povas neekzisti en nia Asocio, ĉar ĝi konsistas el diverspartiaj elementoj.

Sed ĉu estas konsilinde, ke tiuj frakcioj havu aktivan vivon ? Jes, senhezite mi respondas.

En antaŭa ĉapitro, mi montris, ke necesa estas la kuniĝo de ĉiuj laboristaj esperantistoj en sama organizo; ke ĉiuj profitas je tio. Sed necesas ankaŭ, ke ili ĉiuj havu la eble-

*) Komenco en la n-ro 93.

con uzi la SAT-aparaton por la intereso de sia propra partio aŭ tendenco. Kaj ĉu tio estas ebla, se samfrakcianoj ne konas unu la alian, ne helpas unu la alian por plenumi difinitan taskon? Kiu neos, ke klopodoj ĉe partiaj instancoj havas pli da ŝancoj esti priatentataj, se la klopodantoj estas anoj de l' koncerna partio? Sed, por prepari la klopodojn, necesas komuna laboro de sampartianoj. La SAT-aparato devas ebligi tian frakcian laboron, ĉu per publikigo en «S-ulo» de alvokoj al la frakcianoj, ĉu aliel. Se tia laboro ne estus ebla, tiam tutcerte «SAT estus en danĝero», ĉar la diverspartiaj elementoj ne havus profiton en la kuniĝo.

Aliparte, ĉu ne estas konate, ke, ekzemple, la kompartio devigas siajn membrojn labori frakcie en ĉiuj organizoj. Sekve, malpermesi tion al komunistaj SAT-anoj estus meti ilin antaŭ jenan alternativon: aŭ eksiĝi el SAT, aŭ eksiĝi el la partio. Nia Asocio ne devas enmiksiĝi en la interna vivo de politikaj partioj. Ni ne devas debati por decidi ĉu Komintern pravas aŭ ne, devigante siajn membrojn labori laŭ ia metodo.

Sed ne okazu miskompreno. Se temus oficialigi, enstatutigi la *funkciadon* de frakcioj en SAT, mi forte malaprobus tian proponon. Tiaokaze la frakcioj tendencus, vole nevole, al memstara, konstanta vivo; ili celus formi *unuon* kaj fakte ĉesus esti frakcioj.

Tiele konsiderante la demandon, oni ankaŭ povas logike kaj sincere aserti, ke frakcioj ne ekzistas en SAT, ĉar en la Statuto ne estas menciate pri ili.

Pritraktinte ĉi demandon, K-do Zilbelfarb alvenis al stranga konkludo. Li diras en sia artikolo:

«En SAT ne devas ekzisti tendencfrakcioj kiel konstantaj internaj organizaĵoj: por la bona funkciado de SAT tiaj frakcioj estas ne nur nebezonataj, sed eĉ malutilaj...

«...Sed... tendencoj ekzistas ja en la laborista movado. Ni povas bedaŭri ĉi-fakton, sed tamen ĝi restas reala fakto. Kaj ni ne povas, nek devas permesi aŭ malpermesi al ĉiutendencaj proletesp-istoj — ĉu SAT-anoj ĉu ne SAT-anoj — kuniĝi kaj formi laŭ sia plaĉo diversajn organizaĵojn ekster SAT...»

Nu, kompreneble, se oni malpermesas al samtendencanoj, ke ili laboru frakcie per la helpo de la SAT-aparato, estas evidente, ke la tendencanoj ne povos konsenti tian bridadon. *Ekster* SAT ili do kuniĝos, formos apartan organizon kaj... eksiĝos el SAT!...

Tion pruvas plej evidente la ekzisto de TLES. De kiam ekzistas tiu disiga entrepreno, multaj (relative) anarkistaj K-doj ne reaniĝis al SAT. Sendube K-do Zilberfab diros, ke li tion tre bedaŭras, sed ne utilas la bedaŭroj. La simpla logiko instruas, ke kiam premisoj estas eraraj, la konkludo de rezonado ne povas esti ĝusta.

Legante la ĉi suban frazon el la artikolo de K-do Zilberfarb, mi preskaŭ emas pensi, ke li parolis ironie, «eŭtrapelece»:

«Samtempe nia asocio rajtas postuli de la SAT-anoj, ke, estante membroj de tendencorganizaĵoj prolet-esperantistaj, ili varbu en ĉi-organizaĵoj novajn membrojn por SAT.»

Bona intenco! Sed kion instruas la sperto? Ĝi instruas, ke nia Administranto, post la fondo de TLES, ricevis ofte jenajn sciigojn: «Ĉar nun ekzistas anarkista esperantista organizo mi ne plu deziras esti SAT-ano...»

Kaj ĉu povis aliel okazi? Ĉu do K-do Zilberfarb opinias, ke la anarkistoj estas tiom riĉaj je tempo, energio kaj mono, por povi samtempe labori en SAT kaj ekster SAT, pagi plian kotizon, aboni plian gazeton ktp.? Sufiĉas starigi la demandon por ke tuj vidiĝu la respondo.

Mi ne dubas, ke parolis sincere K-do Zilberfarb, tial mi esperas, ke lia sincereco helpos lin vidi kiom erara estas lia vidpunkto.

Estas supozeble, ke frakcioj fariĝos tiom fortaj, ke ili sentos la bezonon havi apartan gazeton, diras iu. Al tio mi respondas, ke tiam la frakcianoj estos ankaŭ akirintaj grandan influon en sia partio. Tiam ili do klopodu por atingi, ke la partia organizo mem prenu sur sin la eldonon de esperantlingva revuo aŭ bulteno. Sed aparta, senkontrola eldono de partia esperanta gazeto flanke de SAT-frakcianoj ne nur estus neutila por la partio, sed malutilus al SAT mem. Ni ne devas misuzi niajn fortojn, se ni deziras, ke nia Asocio estu vigla kaj prospera — kondiĉo necesa por ke ĝi povu plenumi siajn taskojn.

En la ĝenerala stato de l' esperanta movado, partiaj aŭ tendencaj esperantlingvaj gazetoj estas malutilaj; ili povas nur okazigi la malfortigon de la SAT-movado. Aliel estus, se *neesperantaj* organizoj mem prenus sur sin tian eldonon. Al tio ni celu en la frakcia laboro.

(Pluo sekvos.) E. LANTY.

Bona verko pri Sennaciismo

Germanlingvaj Kamaradoj!

Ne delonge aperis en germ. lingvo la verko de l' socialista profesoro *Th. Hartwig:* «Der Kosmopolitische Gedanke!» (La Kosmopoliteca Ideo). Ĝi estas bonega artikolaro pri la aspiroj kaj perspektivoj de l'homaro al sennacieco!

Por ni, sennaciuloj, tiu libro havas netakseblan valoron. Ne povas esti eĉ dubeto pri tio ke ĝi estas *urĝe tradukenda* esperanten. El tiu 216-paĝa libro ni devas uzi la maksimumon de materialo.

Kamaradoj! Inter vi estas multaj anoj de l' Literatur-Fako de SAT. Inter vi estas multaj kapablaj kaj laboremaj tradukontoj. La verko havas serion da ĉapitroj (Kosmopolitigo de l'homaro. — Vojoj al mondcivitana idearo. — La pragmata Kosmopolitismo. — La emocia Kosmopolitismo. — La racieca Kosmopolitismo. — La realiĝanta Kosmopolitismo, k. t. p.) — Do jen estas laboro, kiu facile estas farebla *kolektive.*

Laboremaj sperthavaj K-doj! Anoncu vin al K-do H. MURAVKIN, Paulsborner str. 21, 1, Berlin-Halensee. Tiu K-do interkonsentos kun vi pri la dispartigo kaj la farmaniero de l' laboro.

Kaj tiel ni alportos al nia SAT-anaro novan donacon. Ni faros la laboron rapide, bone, kolektive.

V. ELSUDO.

EKSTER NI

La sennaciismo havas tute neantaŭviditan rezulton: ĝi efikas pacige eĉ rilate lingvan disputon. Mi aludas pri la jam delonge okazanta disputo inter la «ujo-anoj» kaj la «io-anoj».

Vi miras! Nu, aŭskultu mian rakonton.

Antaŭ kelke da tagoj, tute hazarde mi renkontis S-ron Th. Cart, la Prezidanton de l'Esp. Akademio. Ekvidante min, li eksalte senartifike alparolis:

— Ha! estas vi, la malbonulo, la io-ano!... Kial, diable, vi ne deklaras publike, ke nur pro politikaj motivoj, *vi ne uzas la fundamentan sufikson* uj *ĉe landnomoj?...*

Vi ne volas allasi la ekziston de l'nacioj, sekve vi logike povas nur uzi la finaĵon (ne sufikson, diablo!) io. *Tion permesas la Fundamento, kiam la gento ne donas sian nomon al sia lando, Ekzemple, estas tute laŭfundamente diri: Alĝerio, Aŭstralio, Kolombio, ktp.; ĉar tie malaperis* politike *la primitivaj gentoj.*

Ĉar vi ne konsentas esti «franco», mi bone komprenas, ke ankaŭ vi ne povas allasi, ke nia lando estu ujo por francoj...

Sed, mi ripetas, deklaru tion tute malkaŝe, por ke oni sciu, ke nur pro politikaj motivoj kaj ne pro malobeemo al la Fundamento vi ne uzas la sufikson uj *ĉe landnomoj...*

Parolis laŭte, flame kaj entuziasme la vigla, june maljuna kaj simpatia Prezidanto de l'Esp. Akademio. Ĉe lia parolo mia miro estis tiom granda, ke mi ne povis danki kiel decus pro tio, ke li malkovris la kaŝitan motivon, kiu igis la sennaciulojn senkonscie preferi la finaĵon io *ol la sufikson* uj *por nomi la artifike aŭ perforte limigitajn terpartojn en kiuj stulte sin apartigas la popoloj.*

De nun, sen ia konsciencriproĉo pro peko kontraŭ la sankta Fundamento, ni do povos tute libere uzi la formojn Francio, Sovetio, Esperantio, ktp.

Sennaciismo estas ja vera pacigilo. Restas nur varbi al nia ideo la Prezidanton de l' Esp. Akademio! (Ĉu facila la tasko?) Almenaŭ li estu varme dankata pro la liberala permeso, kiun li donis al la sennaciuloj...

EŬTRAPEL.

POR UNUECO!

Ne kredas mi, ke frat' al frato
Venenon sendos en leter',
Ne kredas mi, ke la premato
Perfidos kontraŭ la liber'.

Sen partieca disputado,
Sen nacieca diferenc'
Per kuna longa laborado
Aliros ni al la potenc'.

Ĉar ĝusta estas vojo nia,
Do vivu nuna *nia SAT!*
Nur pro laboro ĝusta ĝia
Ni venkos, laborulo-frat'!

5241.

SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
Asocia Sidejo : 23, Rue Boyer, Paris-XX^e
Adm. Sekretariejo : Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig O 27 — Poŝtĉeka n-ro 6835
CELO : Utiligi praktike la internacian lingvon esperanto, por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda.

OFICIALA INFORMILO

Jarlibro 1926.

Ni sciigas al niaj Perantoj kaj K-doj, ke ĵus elĉerpiĝis la provizo de nia ĉi-jara Jarlibro (1). Lastatempe venis multaj aliĝoj. Dum la pasintaj jaroj ni ĉiam havis reston de pli ol cent. Ni petas la K-dojn, kiuj varbas novajn membrojn, ke ili citu sur la aliĝilo, ĉu la varbito deziras pasintjaran Jarlibron aŭ ĉu ni notu lin por la venonta jaro.

ADM.

★

Al la membraro.

Dum la tempo de la Kongreso ni petas la K-dojn ne tro bombardi la Administracion per korespondaĵoj, ĉar tiam nur unu K-dino deĵoras. Aliel vi devos tro longe atendi ĝis vi ricevos respondon. ADM.

Sur la vojo al Tutmonda Inform-Servo de SAT !

Karaj gesamasocianoj ! Kun granda ĝojo ni povas konstati, ke la glacio de l' inerteco, sub la varmigaj radioj de l' laboremo de kelkaj Kamaradoj, komencis rapide degeli !

La Kremenĉuga « LABESKO » (Laborista Esperanto-Korespondanto) havas jam sciigojn pri tio, ke « labkor »'a laboro estas farata de K-doj el Smolensk, Leipzig, Aalsmeer, Minsk, Tver, London, Cardiff, Harbin, Schweidnitz, Orléans, La Rochelle kaj ceteraj.

Lastatempe organiziĝis multaj oficejetoj kiuj devos ludi la rolon de l' brikoj el kiuj estos finkonstruita nia Tutmonda Inform-servo. Ni scias pri multaj « lab-esp-inform-servoj », « Labesko »'j, informejoj, izolaj « labkor »'oj, sed nia laboro ne jam estas reguligita. Ekz., tre sentiĝas la manko de *Adresaro de l' Inform-servo*. Ĉi-manko malfaciligas la interŝanĝon de artikoloj kaj materialoj. La Kremenĉuga Labesko deziras kompili tian adresaron. Sed por tio ĝi petas ĉiujn inform-servojn kaj izolajn « labkor » ojn SAT-anajn alsendi Kremenĉug' on *senprokraste* poŝtkarton kun respondoj al jenaj demandoj :

1) Nomo (de l' oficejo aŭ de l' « labkor »'o) ;
2) Adreso ;
3) Kian materialon vi sendas, aŭ sendos ? Pri kiuj temoj (pri ĉio aŭ nur kelkaj specialaj temoj) ? Ĉu vi sendas al ĉiuj filioj de l' Inform-servo aŭ ĉu vi havas nur kelkajn viajn specialajn korespondantojn ?
4) Kian materialon vi akceptas ? Kiujn temojn vi preferas ?
5) Redakciojn de kiaj gazetoj vi jam priservas ? Kiajn vi deziras priservi ? (Indiku nomojn kaj karakteron de tiuj gazetoj) ;
6) Kiajn naciajn lingvojn bone scias la partoprenantoj de via Inform-servo ?
7) Ĉu vi prizorgas nur gazet-servojn aŭ ankaŭ interfabrikan korespondadon ?
8) Aliaj sciigoj.

Ĉion sendu al : *Kremenĉug*, U. S. S. R., « Labesko » de SAT., *V. Kolĉinski*. La sendintoj ricevos hektografitan adresaron.

(1) RIMARKO : La statistiko publikigita en la Jarlibro ne montras la veran forton de nia movado. Necesas rimarki, ke en tiu statistiko mankas la nombro de anoj, kies nomo troviĝas en la aldonaj paĝoj. Necesas scii, ke fine de l' jaro 1925 SAT havis 4.500 anojn — kaj ke multaj ne repagis sufiĉe frue la kotizon por ke ilia nomo enestu la Jarlibron. E. K.

PROPONOJ PRI STATUTŜANĜOJ (1)

Sub ĉapitro : Organizo, aldoni : g) sekcioj. En ĉiu loko kie la nombro de SAT-anoj atingas 5, tiuj-ĉi devas grupiĝi kaj starigi SAT-sekcion kiu fiksas sian sekcian kotizon de kiu ĝi pagas al SAT la kotizojn de siaj membroj. La SAT-sekcioj okupas sin pri la celoj indikataj sub punkto 1-a de ĉi-statuto kaj inspiras sin por tio, de la 3-a parto de la Gvida Rezolucio akceptita ĉe la 3-a SAT-kongreso en Cassel 1923. Krom tio la SAT-sekcioj zorgas pri la propagando kaj la instruado de la lingvo Esperanto en la proletaj medioj, kaj starigas (aŭ aliĝas se ĝi jam ekzistas) landan aŭ lingvoregionan asocion kiu prizorgos la eldonadon de nacilingvaj propagandiloj, lernolibroj, k. t. p. kaj gvidos landskale la propagandon de la lingvo Esperanto.

Ĉapitro : Aniĝo.

Modifii la lastan frazon de artikolo 7 jene : En lokoj kie troviĝas SAT-sekcio, la aliĝo al SAT efektiviĝas *nur per aliĝo al la loka sekcio.*

Al artikolo 23 aldoni post la vorto : *urbo* « kie ne ekzistas SAT-sekcio ».

Al artikolo 26, aldoni 2-an paragrafon : « La morala kaj financa raportoj oficialaj, la raportoj de la Redakci-Komisioj de « S. » kaj « S. R. », kaj se eble la jara budĝeto prezentota de la Komitato devas aperi, en « S. » plej laste 30 tagoj antaŭ la malfermo de la kongreso, por ebligi diskutadon antaŭkongresan en la SAT-sekcioj.

Artikolo 28, aldoni : ĉiu SAT-sekcio, ĉe la kongresbaloto, rajtas kolektive je 1 voĉo pri kiu disponas — krom pri sia voĉo — la sekci-delegito *kies nomo kaj SAT matrikulo estas sendita de* la sekcio al la Kongreso komitato, almenaŭ 10 tagoj antaŭ la kongresmalfermo.

Pluraj sekcioj povas esti reprezentataj de komuna delegito ; en tiu okazo la delegito rajtas — krom sian voĉon — je 1 plia voĉo po grupo reprezentata de li, kun tiu limiga kondiĉo : neniu kongresanto rajtas je pli ol 5 voĉoj (inkluzive sia persona voĉo).

Kotizoj.

La ekzekutiva-Komitato fiksas specialan, pli favoran kotizon por la SAT-anoj kiuj aliĝas al SAT per iu SAT-sekcio.

La SAT-anoj *155, 2000, 5286, 1837*, el Bruselo.

(1) La proponoj estas publikigataj sen ia ajn korekto de la Red.

Pri la rubriko " Korespondado "

Ĝi estas kelkfoje trompejo : malbonajn spertojn mi jam faris. Mi povas citi 7 okazojn de miaj kursanoj en Lurè (Ĉeĥosl.), kies proponoj restis tute sen respondo flanke de anoncintoj. Mi citu la nomojn : Grinard (Verviers), Miŝkiu (Taŝkent), Daŭcher (Strasburg), Giĉeva kaj Slovav (Plovdiv), Jakolev (Moskvo), kaj « du lernantinoj » (Kravcova, Rostov-don), ne menciante aliajn, kiuj senaverte rompis la korespondadon.

Mi asertas, ke tiu stato tre kompromitas nian movadon. Estas konstateble, ke kursanoj, kiuj skribis al korespondpetantoj kaj ne ricevis respondon perdas ĉian emon daŭrigi la lernadon kaj aliĝi al SAT. Necesas malhelpi tian fuŝadon. Estas dezirinde, ke sin anoncu nur la K-doj, kiuj havas tempon por korespondadi, aŭ almenaŭ la eblon transdoni al konatuloj la ricevitajn leterojn.

Aukaŭ la korespondantoj devas scii, ke la ilustritaj poŝtkartoj havas pozitivan valoron nur se ili estas ĉiurilate bone prizorgitaj kaj elektitaj.

Unuvorte necesas en la koresponda fako sama seriozeco kiel en aliaj.

SENDIULO.

Al la socialdemokrata esperantistaro de Aŭstrio !

Karaj Sampartianoj !

Kun granda bedaŭro mi vidas, ke vi, pro kiu motivo, mi ne scias, plejgrandparte forestas el SAT, kvazaŭ bojkotas ĝin. Kiel ajn estu, vi faras grandegan, fatalan eraron, kredu al mi.

Mi scias, ke regas en Aŭstrio terura senlaboreco, mi ankaŭ allasas, ke la pago de l' SAT-kotizo por multaj K-doj sendube estas granda elspezo, por la senlaboruloj tute neebla afero, sed tamen vi ne povas ekzisti sen tutmonda kuniganta asocio. Vi povas tiurilate lerni de la neŭtrala movado kaj observi tie tute objektive kiaj estas la kaŭzoj, pro kiuj tiu movado ne prosperas tiom, kiom la sennombraj kursoj gvidataj ĉiujare kaj aliaj agadoj supozigus. La kaŭzo de tio estas la nesufiĉa subteno de la kuniganta tutmonda asocio UEA. Pro tiu nesufiĉa subteno kaj nesufiĉa aliĝo flanke de la multaj emuloj, ilia afero restas nur diletanta, amatoreca, sen fortika resono internacia kaj influeblo en la ŝtataj kaj aliaj neesperantistaj sferoj.

Se vi, karaj sampartianoj de Aŭstrio kaj ankaŭ multaj K-doj en aliaj landoj, daŭrigos la foreston el SAT, ties bojkoton, tiam via sorto kiel esperantistoj estos nepre la sama kiel tiu de la neŭtraluloj. Ne lasu vin luli en falsan sekurecon per tio, ke ĝojige ALLE forte disvastiĝas kaj kreskas en nia lando nuntempe. Viaj multaj membroj, sen kunligo kun la kuniganta ĉiujn ampleksanta tutmonda Asocio, estas komparebla al planto kreskanta sub la influo de elektra lumigado, kiu per tiu arta varmo abrupte alten kreskas, sed tamen ne estas sana kiel nature vivanta planto. Vi povas esti certaj, ke laŭ la cirkonstancoj en pli aŭ malpli proksima estonto venos okazoj, momentoj, kiam vi forte sentos la mankon de kunligo kun SAT. Ekzemple ia internacia kongreso aŭ proletaria internacia aranĝo, kie la esperantistoj, se ili volas ĝuste valorigi nian aferon ne povas nur paroli je la nomo de kiom ajn forta nura landa grupo aŭ organizo. Al tiaj neesperantistaj diverslandaj delegitoj nur imponas la fakto, ke ankaŭ en *aliaj landoj* ekzistas grupoj de tiu organizo kaj sendube ili ankaŭ demandas en tiu senco kaj estas poste tre hontige, se oni jam kun granda ruĝa standardo kun verda stelo en la mezo faris demonstracion kaj poste devas fari elturniĝojn konfesante, ke la afero ne atingas multon trans tiun belegan standardon. La afero nur tiam povas utili, se la koncernaj diverslanduloj *aŭdis jam en ia okazo la nomon, la titolon de tiu organizo :* kaj se ili al vi respondas : Nu certe, jes, mi memoras, ankaŭ en mia urbo mi aŭdis pri tiu asocio, ktp., se tio konstante okazas, tiam pli kaj pli enradikiĝas en la cerboj de indiferentaj sampartianoj la penso : SAT estas la tutmonda proletaria esperantista afero kaj malrapide eble, sed *certe kaj nepre* venos la momento, kiam oni havos respekton por nia afero.

Mi petas vin, karaj sampartianoj, ne timu pro iaj momentaj malfaciloj en la takso de

nia afero, en la takso de SAT, eble eĉ flanke gvidantaj aŭ influhavaj socialdemokratoj neĝuste informitaj de malbonvoluloj aŭ kiuj momente estas iom skeptikaj kaj hezitas subteni nin aŭ ne laŭ merite konsideras SAT-on. Ne lasu timigi vin per la momenta ĝeno, ke eble enviuloj aŭ aliaj barantoj disfamigas en nia partio, ke SAT estas « komunista afero ».

La fondo de tutmonda proletaria esperanto-organizaĵo kiel SAT estis nepre necesa; ĝi estis, por tiel diri, « en la aero ». Do, krei novan asocion, estus vana klopodo, tute senutila perdo de fortoj kaj energio. Frakasi, detrui SAT-on, malhelpi ĝian normalan progreson, ne estas ia motivo por tio nune, kiam ties funkciuloj en Leipzig kaj Paris bone kaj lojale agas. Ankaŭ se aŭstrianoj gvidus tian asocion, ili baldaŭ vidus, ke la afero estas sufiĉe nedanka kaj ankaŭ ili ne kapablus, ĉiujn kontentigi, eĉ kun la plej bona volo. Ni konsideru, ke la SAT-funkciuloj estas personoj, kiuj post penplena profesia laboro ĝis malfrue en la nokto, idealisme, sen ia persona profito agas. Kredu al mi, ke ili estas malriĉaj proletoj. Ni do ne malfaciligu kaj baru al ili la jam sufiĉe dornoplenan taskon.

SINCERULO.

(Daŭrigota.)

Pri esperanto-movado en Franclingvio

« Fédération Esp. Ouvrière » preskaŭ nenion faras, diris K-do Dneprano en la N-ro 90 de « S-ulo ». Ni devas protesti kontraŭ tia facilanima aserto. Estas ja vere, ke la rezultoj de nia propagando ne estas kontentigaj, sed tio ne signifas, ke ĝi estas malvigla. Nura legado de nia informo en « Kroniko » (N-ro 89 de « S-ulo ») montras ke ni ne preterlasas okazon propagandi. Lernolibroj estas aĉetataj grandkvante; propagandiloj disdonataj malavare. Sed francoj ne emas lerni lingvojn. Al ili cetere tro ofte eksterlandanoj parolas franclingve. La francoj do aĉetas lernolibrojn, ĉar ili simpatias esperanton, sed tute ne lernas la lingvon. Ĉu estas eble perforti ilin?

Dneprano ankaŭ bonvolu ne forgesi, ke ĉi-tie la klaskonscia parto de l' laboristaro ĉefe pensas pri la urĝaj ĉiutagaj taskoj en sindikatoj kaj partioj: « Ni unue preparu la Revolucion, ili diras, poste ni lernos esperanton ». Tia rezonado estas ja tre lama, sed kredu, ke ne estas facile ties malpravecon forigi.

Anstataŭ paroli tiel senpripense, Dneprano prefere notu bone en la memoron, ke la proporcio de SAT-anoj rilate al FEO-anoj (t. e. anoj de nacilingvaj asocioj) estas pli granda ol ie ajn.

Tial ke ni ne volus, kiel nia subjektiva kritikanto, misuzi lokon en « S-ulo » per pli longa respondo, ni nur konsilos al la Redakcio de nia gazeto, ke ĝi estu malpli akceptema por seupripensaj asertoj.

Fédération Espérantiste Ouvrière, 177, rue de Bagnolet, Paris (XXe).

DIVERSAĴOJ

IV-a kongreso de « Eduk-Internacio »
Vieno (9, 10, 11, 12 Aŭg. 1926).

La Eduk-laborista Internacio, fondita en 1920, estas unueca organizo tutmonda, nun grupiganta 600.000 avangardajn edukistojn el ĉiuj landoj. Ĝi estas konata de esperantistoj (ĉar de komenco ĝi uzas esperanton por siaj internaciaj rilatoj) sub la mallongiga nomo: « Eduk-Intern ».

Pro manko de loko ni ne povas publikigi la tagordon de ĝia IV-a Kongreso; sed ĉiuj interesatoj eksciu, ke sufiĉas al ili sin turni al jena adreso: L. Vernochet, sekr. de « Eduk-Intern », 33, rue de la Grange-aux-Belles, Paris (Xe), por ricevi ĉiujn deziratajn informojn.

Tamen la SAT-anaro devas noti bone en la memoron, ke niaj K-doj Mark Starr (London) kaj Marcel Boubou (Orléans, Francio) partoprenos la kongreson kaj klopodos per kaj por esperanto.

★

Radiuloj atentu!

En la intenco plivigligi la radio-rubrikon en nia gazeto, K-do Henri Nicollet, 91, rue de Trion, Lyon-Ve, konsentas preni sur sin la prizorgadon de tiu rubriko. Li alvokas al ĉiuj interesatoj interrilatiĝi kun li, en la celo starigi laborplanon. Antaŭen por ebligi baldaŭan starigon de Radio-Fako en SAT!...

★

Kropotkina Muzeo en Moskvo.

La SAT-anoj admirantoj de P. Kropotkin lastatempe ekĝojis eksciante, ke baldaŭ aperos en esperanto unu grava verko (Etiko) de l' fama revoluciulo. Ili denove ekĝoju: en Moskvo oni nun vigle klopodas por pliriĉigi la muzeon starigitan je lia nomo. Ĉi okaze la SAT-anaro estas varme petata helpi en tio per alsendo de libroj, gazetoj, fotoj ktp., unuvorte per ĉio rilatanta al la vivo kaj agado de l' genia pensulo.

Krom tio, en Moskvo stariĝis antaŭ nelonge komitato por fondo de muzeo je la nomo de M. Bakunin. Saman peton kiel supre ni direktas al la SAT-anaro, ĉar la 1-an de septembro estos aranĝata ekspozicio je la memoro de Bakunin en la Kropotkina muzeo.

Ĉiujn sendaĵojn oni adresu jene: Muzeo de P. Kropotkin, Kropotkina per. 6, Moskvo.

La K-doj dezirantaj ricevi ion rekompence skribu al Aleksandro Liljer, Brjanskaja 15-2, Moskvo.

★

La unua Paneŭropa Kongreso okazos en Wien de la 4-a ĝis la 7-a de oktobro 1926. Ĝi estas kunvokita de la Paneŭropa Unio kaj esploros la problemojn pri unuiĝo de Eŭropo. Notinde estas, ke en tiu kongreso esperanto ĝuos la saman rajton kiel naciaj lingvoj.

Informojn liveras: Paneŭropa Unio, Wien, I. Hofburg.

★

Ĉiu laborulo devas ekscii pri la teorio de S. Gesell, nome: « Libera Ekonomio per Libera lando (!) kaj Libera mono ». Estas facile ricevi informojn, sufiĉas skribi en esperanto al: Fhysiokatischer Hampfbund Berlin. C. 54. Sophienstr. 6. — Komuniko de SAT-ano 1857.

★

K-do Günter Daŭs, Averstr. 20. Wattenscheid i/w. Germanio, estas la sola SAT-ano en tiu urbo. Por vigligi la tiean movadon li deziras organizi ekzposicion; oni helpu al li per sendo de poŝtkartoj, ktp., ktp.

★

Ĉe liberpensula kongreso okazinta la 5-an de julio en Neuchâtel (Neŭŝatel, Svisio), estis vigle diskutata la demando pri lingvo internacia. La angla kaj la latina estis proponataj.. Neniu decido rezultis. Ĉu tiuj « liberpensuloj » liberpensas? — « 150 ».

KRONIKO

Argentino.

Buenos-Aires. — Fondiĝis anarkista esp. grupo, gvidata de K-do A. Barrot. Argentina Esp. Asocio aranĝis tri kursojn: 60 p. — Baldaŭ aperos bulteno en hispana k. esp. lingvoj. — FONTAN.

Aŭstrio.

Wien. — La Aŭstria Lab. Ligo Esp. decidis sendi al nia VI-a 4-membran delegitaron. Tia decido esperigas, ke finfine oni ĉi-tie komprenos, ke ekster SAT ne povas ekzisti laborkapabla esp. movado tutmonda. — ERIK.

Germanio.

Berlin. — 12 el la 34 ĉi-tieaj SAT-anoj kunvenis, 25 — VI. — 7 aliĝoj al la Kongreso; nur 2 aŭ 3 K-doj tamen povas forveturi. Ni planas revigligi la movadon en aŭtuno. — *483*.

Mittweida, i. sa. — Progresetas nia movado: La LEA-grupo havas 34 anojn; bedaŭrinde el ili nur 9 aliĝis al SAT ĝis nun. En junio okazis ekzameno de la kursanoj: 5 ricevis libropremion. — *2924*.

Essen. — Funkcias 7 kursoj. Instruado per « Petro », kies 230 ekz. jam disvendiĝis. Tuta SAT-biblioteko enviciĝis la libraron de l' liberpensuloj. — *3414*.

Meerane. — Ricevis ni el Sovetio leteron kiun ni tradukis k. laŭtlegis en kunvenoj. Efiko bonega: kurso kun 15 p. (Lernlibro: « Petro »). — *1097*.

Sovetio.

Ivanovo Voznesenk. — Alilandaj laboristinoj vizitis nian urbon. Inter ili unu (Odette Brier) scipovis esp-on. Bonefikis.

Jalta. — Dum junio okazis 4 lekcioj pri esp-o en diversaj lab. rondoj. Finiĝis kurso kun 32 gelern. — *5087*.

Leningrad. — En « Domo de kleriglaborantoj » parolis K-do Poniŝevski pri esp-o. La muzeo de l' Popola interligo akceptis proponon de K-doj Majnov k. Poniŝevski pri organizo de aparta fako por int. lingvo. Tiucele la muzeo uzos esp-on.

Minsk. — Vizito de K-do Michaliĉha, kiu raportis en partiaj kluboj pri la situacio en Aŭstrio. Intervjuoj aperis en gazetoj. — Dum nur unu semajno aperis en Blankrusia gazetaro 25 leteroj trad. el esp-o. — *603*.



RECENZEJO

Mateo Falcone kaj aliaj rakontoj de Prosper Mérimée. El la franca lingvo tradukis J. Borel. N-ro 1 de Biblioteko Tutmonda. 1926. Formato 10 ½ × 17 cm. 62 pĝ. Eldonejo: Rudolf Mosse, Esperanto-Fako, Berlin SW 19. Prezo: 10-numera serio 4 mk. germ.

Ĉi kajero enhavas kvar rakontojn de la franca verkisto Prosper Mérimée, kiu vivis en la pasinta jarcento. *Mateo Falcone* estas novelo, kiu temas pri vivado kaj karakteroj de la korsikanoj. *La sieĝo de La Rochelle* kaj *La konkero de Reduto* estas interesaj historioj. La unua bildas fragmenton de la terura proreligia milito de 1572 inter la katolikoj kaj protestantoj en Francio. La dua rakontas pri impresoj kaj sentoj de juna oficiro dum lia unua batalo. En la *Letero pri virbovaj bataloj* ni vidas bonegan priskribon de tiuj hispanaj ludoj.

Eksterajo, preso, papero estas modelaj. Ne necesas laŭdi la tradukon mem. Senriproĉa estas la stilo, kaj preseraroj ne enestas.

Yerk.

Esperanto-instruado laŭ rekta metodo en 10 lecionoj (por instruistoj). Prezo: 1 svisa franko. Havebla ĉe la aŭtoro K-do Ultmann, gvidanto de la kleriga fako de Aŭstria Laborista Ligo Esperantista, Wien, IX. Berggasse 32/6.

En formo tre modesta, sed kun valora enhavo, aperis tiu-ĉi verko. La laboristoj, kiuj urĝe bezonas esperanton, devas lukti kun malfacilaĵoj lernante ĝin. La rekta metodo, forlasante la penan klarigadon de gramatikaj konceptoj kaj evitante la konfuzantan nacian lingvon, grave faciligas la lernadon. La eksperimentoj kun la Ultmann'a metodo dum la lasta jaro en Vieno havis plenan sukceson. La verko servas kvazaŭ bazo por la uzado de « Petro », ĝi devus do en pli inda vesto aperi ĉe SAT. Kelkaj preseraroj ne ĝenas, ĝi ja estas farita por instruistoj, bone sciantaj nian lingvon. Kiu volas interese kaj sukcese gvidi kurson ĉe laboristoj, tiu mendu ĝin.

E. Sonnenfeld.

KORESPONDADO

TARIFO

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.

MALLONGIGOJ: L — letero, PK — poŝtkarto. PI — poŝtkartoj ilustritaj. PM — poŝtmarkoj. bfl. — poŝtmarko sur bildflanko. k. ĉ. l. — kun ĉiuj landoj. esp-aĵo — esperantaĵo.

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Aŭstrio.

— *Du lab-istoj* dez. koresp. kun gek-doj el ĉ. l. Adr.: *E. Blauensteiner*, Rückertgasse, 8/13, *Wien, XVI.*

— Lab. geesp-istoj plejparte SAT-anoj dez. koresp., certe resp. Adr.: *Laborista Esperanto Klubo* Gasthaus Schindler, Albrechtsstr. 69, *Klosterneuburg ap. Wien.*

Francio.

— K-do *F. Ocsiznik*, 4, rue Mariano, *Strasbourg-Neudorf*, dez. interŝ. PM, PI, bfl. precipe kun Rusio k. orientaj landoj. Sendu unue. Reciproko garantiata.

— 12 gek-doj dez. kor. pri diversaj temoj k. ĉ. l. Adr. Etienne Al. 8, rue Hermite, Nancy.

Germanio.

— *Dek gelernantoj* dez. koresp. k. ĉ. l. Resp. garantiata. Adr.: *Erich Alt, Neukirchen i. Erzgeb.*

— K-do *Albert Eichler*, Waldenburger Str. 14, *Meerane i S* dez. koresp. PK. PI. k. ĉ. l.

— K-do *Josef Eidelkind*, Chaussee Str. 3-a, *Holzweissig ap. Bitterfeld*, dez. koresp. L, PK, PI, k. ĉ. l. pri ĉ. temoj.

— K-do *Hermann Kuhwede*, Chaussee Str. 62, *Holzweissig ap. Bitterfeld*, dez. koresp. L, PK, PI, k. ĉ. l. pri ĉ. temoj.

— *Peto:* K-do Frico Frej revenu al Rostock, Himmelfahrtstr. 3, aliel nia grupo malprosperos! Ankaŭ alia K-do, kiu scias bone instrui estas bonvenanta. Skribu al: K-do *2530 en Rostock.*

— *Esp. Rondeto* dez. koresp. L, PK, PI, k. ĉ. l. Adr.: K-do *A. Schäfer*, Beethovenstr. 1, *Stuttgart.*

Sovet-Unio.

— K-do *Petro Ĵukov*, militkursano, Voenno-Politiĉesk. Skola, *Smolensk* dez. koresp. pri ĉ. temoj, k. ĉ. l.

— K-do *V. Kotelevcev*, Jukowskaja ul. 41, *Ekaterinoslav*, pri ĉ. temoj, k. ĉ. l. L, PI, Resp. garantiata.

— K-do *M. Vail*, Bratska 11, kv. 9. *Kiev*, dez. koresp. k. gekongresontoj.

— K-do *D. Viktorov-Ĉeĥoviĉ*, lekciisto, Klovski Spusk. 2, *Kiev*, dez. L, PI, PM, papermono, gaz., fotaĵoj, esp-aĵoj k. ĉ. l.

— K-do *I. Sklemenov, s. Baraĥoevo*, Krasnojarsk. r. Ĉitinsk. okr. Siberio, pri div. temoj k. ĉ. l.

— *Gelernantoj de Pedagogia Teknikumo*, petas gek-dojn el ĉ. l. sendi L, PK, PI, por vespero de eksterlanda korespondado, aranĝota meze de Septembro. Adr: K-do *Bogdanov*, Pedteknikum, *Veliĵ*, Pskovsk. gub.

— K-do *G. V. Mokrecov*, (28 j. invalido) prosp. Sverdlova 8, kv. 1. *Oranienbaum*, Leningr. gub., dez. koresp. pri ĉ. temoj.

— *Ĉelo de IRH*, dez. koresp. k. samaj organizoj en ĉ. l. Adr.: *Stalingrad*, Dubovskaja 1. Resp. garantiata.

— *Adresŝanĝo:* K-do *E. Flejs*, Agitprop Gubkoma VKP (b), *Vjatka*. — K-do *M. Lapin*, ul. Urickogo, 54, *Ilvalinsk*, Volsk. u. Sarat. gub. pri div. temoj k. ĉ. l. L, PK, PI.

— K-do *R. Nikolskij*, redakcio « Krasnoarmejskaja Pravda », *Smolensk*, serĉas gekoresp-antojn el ĉ. l. por rusaj gaz. Ankaŭ k-doj, kiuj konsentas presigi peresp. artikolojn el Rusio por siaj naciaj lab. gaz.

— K-do *G. Ĉirkov*, Kolektivnaja, 2, *Tuapse* (Kaŭkazo) dez. koresp. knn radioamikoj k. pri radiotekniko k. ĉ. l.

— *Grupo de gekursanoj* dez. koresp. kun eksterl. gek-doj. Adr.: K-do *B. Sobolev*, Leningrada ŝoseo, 80, *Tver.*

— Lernantoj de II-a ŝtupo dez. kolektive koresp. kun lernantoj de ĉ. l. Adr.: K-do *G. Marĉenko*, Ŝkola II. stup. III gr. *Tuapse* (Kaŭkazo).

— K-do *Bazilo Belakov*, Kolektivnaja 2, *Tuapse* (Kaŭkazo), dez. interŝ. fotoportretojn de vizitontoj VI-an SAT-kongreson.

— *Adresŝanĝo: I. A. Jakovlev*, Jitnaja, 5, kb. 18, *Moskvo 54*, (stratsŝanĝo).

KORESPONDEJO

E. Adamson. — Ni ĉiam recenzas la verkojn duekzemplere ricevitajn, la unuekzemplere ricevitajn ni mencias. — *Red.*

SAT-anoj (Tallin). — Bona estas via ideo. Ni projektas ion similan okaze de la kvinjaro de SAT k. de la 100-a n-ro de « S-ulo ». Mankas loko. — *Red.*

5583. — Via kronikaĵo estas dekoble tro longa; kial do vi ne sendis ĝin al « La Esperantisto », kies bildon ni vidas sur la danke ricevita foto? — dum forestas « S-ulo » k. S. R.! — *Rea.*

5787. — La logika konkludo de via rakonto estas, ke la simioj estas perfektiĝintaj homoj!! Ne uzinda en « S-ulo ». — *Rea.*

SAT-anoj 4102, 6082, 5960. — Viaj proponoj estos transsendataj al la Kongresestraro.

670. — Via informo pri H. M. estas interesa, sed mankas loko. — *Red.*

Gekamaradoj V. Feuiller, Capoulade k. G. Salan. — Principe ni publikigas nur proponojn pri statutŝanĝoj. Viaj, cetere plejparte aprobindaj, estos diskutataj ĉe la kongreso. — *E. K.*

K-do *Van Aelst.* — Viaj pledoj estas sendotaj al Leningrad k. debatotaj ĉekongrese. — *E. K.*

5066. — Viaj informoj ne povas interesi tutmondan legantaron. — *Red.*

Voko. — Via artikolo estas tro longa k. cetere ne havas intereson por tutmonda legantaro. — *Red.*

6162. — Prave! Bonan sukceson!... — *Red.*

6847. — Legu en la rubrikon « Korespondado ». — *Red.*

Dneprano. — Ni konsentas kun vi: ni eklaboras por ke « ĝi » ne falu. — *Red.*

1851. — Via artikolo estas kvazaŭ denova eltrovo de Ameriko! Kompreneble vi pravas. — *Red.*

3125. — Mi konsilas, ke vi legu: « For la Neŭtralismon! » — *Red.*

1934. — Via propono estas absolute mistrafa: SAT ja tute ne havas kiel taskon propagandi esperanton, sed ebligi ties praktikan aplikadon. La nacilingvaj organizoj propagandu esperanton. Tamen ni sendos al Leningrad vian proponon. — *Ł. K.*

5761. — Neniu atakis esp-on en « S-ulo ». Male, Iuelie celis tute prave instigi la SAT-anojn, ke ili funde lernu la lingvon. Kiuj blufe asertas, ke nia lingvo estas ellernebla dum kelkaj semajnoj, tiuj estas senkonsciaj malamikoj de esp-o. Estu certa, ke Iuelie ne estus same parolinta, se li skribus nacilingve pri la sama temo. — *Red.*

V. Klason. — Estus multe pli simple se vi sendus vian inviton senpere al la interesatoj. *Red.*

Al kelkiuj. — Kuŝas antaŭ ni amaso da manuskriptoj, kiujn ĝis nun ni ne sukcesis legi pro manko de tempo. Ni nur konstatis, ke estas pluraj apenaŭ legeblaj, kiuj verŝajne trovos lokon en... paperkorbon! — *Red.*

Neuzitajn manuskriptojn ni ne resendas. - Represo de artikoloj permesata nur, se oni citas nian organon kaj sendas al la Red. du ekz. de la represaĵo.

Jarabono: **Argentino** 6 pesos; **Aŭstrio** 12 ŝil.; **Belgio** 40 fr.; **Brazilo** 13 milr.; **Britio** 110 penc.; **Bulgario** 220 lev.; **Ĉeĥoslovakio** 60 kr. **Danio** 10 kr. d.; **Estonio** 650 mk.; **Finnlando** 70 mk.; **Francio** 40 fr. fr.; **Germanio** 8 mk. or.; **Hispanio** 13 peset.; **Hungario** 8 kr. or.; **Italio** 50 lir.; **Japanio** 4.50 jen; **Jugoslavio** 130 din.; **Litovio** 16 lid.; **Nederlando** 6 guld.; **Norvegio** 10 kr. norv.; **Polio** 10 zlot.; **Portugalio** 40 esk.; **Rumanio** 350 lej; **Rusio** 4 rubl. or.; **Svedio** 8 kr. sved.; **Svisio** 10 fr. svis.; **Usono** 2.50 dol.

Ankaŭ 1/4 jare abonebla. — Ponumera prezo: 0.20 mk.

Le Gérant: L. GLODEAU. ★ Esperanto-Presejo J. Solsona, 9, Rue Hallé, Paris-14e — Telefono: Gobelins 62-71